



# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



## Baldaŭ en vian hejmon!

**Pri la 65<sup>a</sup>  
IJK en  
Liberec'**

**Ĝisdate pri  
Pasporta  
Servo**

**Iĝu B-  
komitatano**



*Saluton!  
Jen vi ricevas  
TT plenan je  
artikoloj,  
raportoj kaj eĉ  
recenzo pri  
lastatempe  
eldonita komikso  
kiun itala teamo  
tradukis al*

*Mi ankaŭ atentigas vin ke mia  
loĝadreso ŝanĝiĝos ekde la 1a de  
marto 2010.*

*Mi esperas ke vi ĉiuj ĝuos la  
legadon de tiu ĉi numero!*

Nicola

### Enhavo

*Esperanto.  
Vi povos legi ĝisdatigojn pri  
Pasporta Servo kaj ties eta  
odiseado en klara kaj hela raporto  
de TEJO-estrarano Saša  
Kovyazina, alvokon por iĝi B-  
komitatano de TEJO kaj konkurs-  
regularon por partopreni  
favorpreze en la venonta IJK en  
Kubo.*

*Mi kaptas la okazon por memorigi  
al vi re-aligi al TEJO, ĉar sen vi,  
kara membro, nia asocio ne havus  
motivon ekzisti.*

|                                                            |    |
|------------------------------------------------------------|----|
| Liberece en Liberec'.....                                  | 3  |
| 2a Junulara Renkontiĝo inter Oomoto<br>kaj Ŭombulismo..... | 7  |
| Nova TEJO-estraro kunvenis en<br>Poznano.....              | 9  |
| TEJO-komitato neformale kunvenis<br>dum JES.....           | 10 |
| Pasporta Servo: ĉu reta kontraŭ<br>libreta?.....           | 11 |
| TEJO en COMEM.....                                         | 13 |
| Iĝu B-komitatano.....                                      | 14 |
| IJK 2010.....                                              | 15 |
| Konkurso Partoprenu IJKn 2010.....                         | 15 |
| De tertremo al helpemo.....                                | 16 |
| Intervjuo al Aleks, TEJO-<br>volontulo.....                | 17 |
| Recenzo: Diabolik.....                                     | 19 |

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu rete al [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org) (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola RUGGIERO), Bræðraborgarstígur 55, 101 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikiĝi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Nicola RUGGIERO** (Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org). Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: [skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl). **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

## Liberece en Liberec'

de *Daniel Mrázek*

Nekredeble! Sesdek kvar fojojn okazis Internacia Junulara Kongreso. Tio estas tre granda historio. Sed io en ĝi mankis – IJK en Ĉeĥoslovakio aŭ simple Ĉeĥio. Mankis – ĝis nun. La ĉijara 65-a IJK ĉion aliigis. Finfine ankaŭ ĉeĥoj povis gastigi la plej gravan junularan E-arangon! Kaj ankoraŭ nun – kiam mi rememoras pri la pasinta IJK – mi ekhavas iun strangetan senton. Ĝis nun mi partoprenadis la kongreson nur kiel simpla partoprenanto. Ĉijare mi iĝis organizanto. Dum la tuta jaro mia



retpoŝt-kesto pleniĝis je amaso da retmesaĝoj pri la IJK. Kiam mi renkontiĝis kun iuj

esperantistoj, ni parolis ĉefe pri la IJK. Kiam mi kun iu babilis pri Esperanto, mi emfazis la IJKn. Mia tuta vivo ekapartenis al la IJK. Kaj nun – du monatojn poste – mia vivo revenis al “normaleco”. Tio, kion mi tiom ĝoje kaj streĉite atendis, estas for. Restas nur rememoroj. Rememoroj pri libereco, kiu ekregis la ĉeĥan urbon Liberec.

La urbo Liberec' havas por ni kelkajn avantaĝojn. La unua estas klara – ĝi nomiĝas Esperante :-)) (tio ja ne estas intenco, sed tamen la nomo belas) – do la kongreso ekhavis temon LIBERECO. Kaj la dua estas geografia – ĝi troviĝas proksime de la landlimoj kun Germanio kaj Pollando. Do la ĉijaran IJKn organizis tuj tri landaj sekcioj – krom Ĉeĥa E-Junularo (ĈEJ) ankaŭ Germana E-Junularo (GEJ) kaj Pola E-Junularo (PEJ). GEJ kaj PEJ havas riĉajn spertojn pri organizado de internaciaj renkontiĝoj, do ili tre multe helpis al ĉeĥoj.

Mia tasko por la IJK estis eksteraj



jén la aŭtoro de la artikolo



rilatoj en Ĉeĥio. Fakte tio signifas, ke mi devis anoncigi la kongreson en amaskomunikiloj kaj alparoli gravulojn, kiujn ni intencis patronigi. Mi ĝuis tion supozante, ke neniam plu en mia vivo mi ricevados leterojn de la plej gravaj politikistoj, en kiu mi estas alparolata “estimata sinjoro vicprezidanto” (mi estas vicprezidanto de ĈEJ). Ni havis kialon por kontento – krom la prezidento (kiu antaŭ ne longe esprimis, ke Esperanto estas mortinta lingvo) patroniĝis ĉiuj – eksa ĉefministro Mirek Topolánek, ĉefepiskopo de Prago kardinalo Miloslav Vlk, prezidanto de Senato Přemysl Sobotka, prezidanto de Deputitaro Miloslav Vlček, vicregionestro de Libereca Regiono Radek Cíkl, ĉefurbestro de Liberec Jiří Kittner kaj (tio estis merito de germanaj kunorganizintoj) ĉefurbestro de libereca partnera urbo Augsburg Kurt Gribl.

La kongreso komenciĝis sabate la 18an de julio. Dum la tuta tago venadis

partoprenantoj, kiuj devis longe atendi en vicego, ĉar aperis problemoj ĉe komputiloj kaj do oni ne povis registri la alvenintojn. Sed feliĉe la problemoj solviĝis kaj do ni povis iri al proksima kultura domo por solene malfermi la kongreson. Efektive solene, ĉar al ni kantis mondfama ĉeĥa infana ĥoro Severáček (Norduleto), kiu kantis tri ĉeĥajn popolkantojn en Esperanto. Poste parolis prezidanto de TEJO Gregor Hinker, prezidanto de la IJK kaj ĈEJ Marek Blahuš, aliaj gravuloj en E-movado – vi certe povas mem tion imagi kaj mi vere ne volas enuigi vin per tio. :-)

Dimanĉe antaŭtagmeze vizitis IJKn unu el ĝiaj patronoj. En loka preĝejo diservis en Esperanto praga ĉefepiskopo kardinalo Miloslav Vlk, kiu junece estis aktiva en Esperanto-movado. Dum lia prediko li diris, ke Esperanto kreas komunumon. Liavorte tio estis la unua sankta meso, kiun li servis en la internacia lingvo. Kion mi fakte ne atendis, sed tamen tre bonis – la ĉeesto de la kardinalo allogis kelkajn ĵurnalistojn kaj eĉ en ĉefaj informoj en radio (apud politikaj kaj



mondaj aferoj) aperis, ke en Liberecon venis kardinalo por diservi por la kongreso de junaj esperantistoj.

Post la diservo interesintoj povis promeni en urbo kaj per trajno veturi al monto Ještěd, kiu superas la urbon. Kun siaj 1012 metroj ĝi apartenas al la plej altaj ĉefaj montoj. Ĉar mi estis interesito, mi povis vidi la tutan belan pejzaĝon, ĉar ne estis nuboj kaj vetero estis favora. Eble ni restus tie ankoraŭ ĝis nun, se subite ne venus vento kun nuboj, kiuj kovris la panoramon. Ni do revenis. Kaj indis reveni! Vespere okazis koncerto de loka rokmuзикgrupo PECH, kiu preskaŭ ĉiun dancigis. Nur problemo estis, ke en la koncertejo tute mankis iu freŝigilo, do niaj vestaĵoj estis malsekegaj.

Mardo apartenis al ekskursoj. Kiel denaska pragano mi (kun helpo de du aliaj ĉiĉeronoj) gvidis la ekskurson en Pragon. Du komfortaj aŭtobusoj veturigis nin al tramejo, kie atendis nin du historiaj tramoj. Ili devenis el la



30aj jaroj de la 20a jarcento kaj por unu horo estis nur niaj. Per ili ni veturis tra la urbocentro, ĉar tute ne eblis montri ĉiujn vidindaĵojn dum unu tago. Do almenaŭ el tramo ili estis vidataj. Per tramo ni alveturis al Praga Kastelo. Nia ekskurso estis historia kaj astronomia. Prago havas longan historion kaj la nuna jaro estas Intenacia Jaro de Astronomio. En Prago vivis kelkaj gravaj astronomiistoj, ekzemple Johano Kepler aŭ Tycho Brahe. Do dum la promenado ni vidis lokojn kun ili ligitajn.

Trairante la kastelon ni fiere super niaj kapoj portis tukon kun surskribo ESPERANTO. Tamen ĉefa prezidento sidanta en la kastelo rifuzis patroniĝi nian kongreson. :-)

Posttagmeze ni revenis en Liberecon. (Uf, mi timis, ke mi kaŭzos iun malfruiĝon, sed bonŝance mi tiam nefuŝuliĝis.:-) ) Ĉiuj ĝojatendis venintan tagon. Sur la ĉefa placo koncertis la fama esperantista kantisto



JoMo akompanata de alia fama kantisto Kimo. Li intencis rompi mondan rekordon uzante la plej grandan nombron da lingvoj dum unu koncerto. Li sukcesis tion fari antaŭ kelkaj jaroj kaj ĉijare li volis plibonigi tiun rekordon. Ankaŭ tio venigis ĵurnalistojn kaj oni eĉ telefonis al mi el radio. Bedaŭrinde ni poste eksciis, ke la rekordo rompita ne estis, ĉar jam iu kantisto en multege da lingvoj. Nu, espereble iam en estonteco...

Ĵaŭde ni denove okupis la ĉefan placon organizante Kulturan kaj Lingvan Festivalon (KLF). Kongresintoj kaj lokuloj povis konatiĝi kun ĉirkaŭ 40 nacioj, kiuj venis al la kongreso, povis ĝui iliajn kantojn, lingvojn kaj precipe povis gustumi iliajn specialaĵojn. Fine de la festivalo koncertis Kimo, sed li ne rajtis koncerti longe. Subite mallumiĝis kaj venis pluvego kun forta vento, kiu eĉ kaŭzis kelkajn gravajn problemojn en la urbo. Sed bonŝance la problemoj ne tuŝis IJKn kaj vespere post la pluvo ni povis en la kongresejo ĝui koncerton de muzikgrupo Supernova, kiu en Liberec ekis sian eŭropan turneon.

Vendrede ni iom malgajis. Ĉie videblis la alproksimiĝanta fino. Nur la lastaj prelegoj, kaj jen la adiaŭa vespero. Dum ĝi montriĝis, ke nia IJK fakte estis pli-malpli fama en “ne-Esperantio”. Aŭdis pri ni gepatroj de 10jara knabo, kiu gitarludas kaj koncertas kun famaj ĉefaj folkmuzikgrupoj. Kaj tiu knabo

eksopiris gitarludi ankaŭ al junaj esperantistoj. Mi persone admiris la knabon, ĉar li ludis kaj kantis vere bone. Mi eĉ iom enviis al li, ĉar miaj gitarludkapabloj ne estas bonaj...

Ĉe boteloj de frua temp', jen la rezulto, jen fina venk', ĉu mi daŭre restu ridanta? (La Lasta Kanzono, Supernova) La semajno pasis. Por ni, organizintoj, pasis la tuta jaro. Mi pensas, ke nekalkuleblas, kiom da boteloj ni eldrinkis... Kvankam ni malĝojis pro la adiaŭo, ni povas resti ridantaj. Ridantaj pro tio, ke ni vidis geamikojn kaj ke ni ekkonis geamikojn novajn. Ni esperu, ke ni denove renkontiĝos.

Ni revenis hejmen. Mi ankoraŭ ĝuis mian praganecon, ĉar kelkaj esperantistoj decidis por kelkaj tagoj ankoraŭ resti en Prago, do mi povis renkonti ilin, ĝis kiam ankaŭ ili forflugis...

Mi ne scias, ĉu mi rajtas juĝi pri boneco de la kongreso, se mi estas kunorganizinto. Tamen la libereca IJK restas en miaj rememoroj tre agrable. Mi deziras al kubaj esperantistoj, ke ankaŭ ili havu belegan IJKn. Verŝajne mi ĝin ne povos partopreni, sed ie iam mi esperas renkonti vin ĉiujn.



## La 2<sup>a</sup> Junulara Renkontiĝo inter Oomoto kaj Ŭonbulismo

de OKUŬAKI Toŝiomi, vicedro de Junulara Fakto de Oomoto (Japanio)

La Junulara Renkontiĝo inter Oomoto kaj Ŭonbulismo (JURE) komenciĝis ekde pasintjare, surbaze de la dokumento interŝanĝita inter Junulara Fakto de Oomoto kaj Ŭonbulisma junulara organizo "Amikoj de Paco" en aprilo 2007, kiu decidis la reciprokan vizitadon pere de Esperanto. Danke al tiuj ambaŭ religioj favoraj al Esperanto, la kunlaboro kreskas kaj fariĝis efektive ununura interreligia agado en la junulara Esperanto-movado. La raporto pri la unua JURE troviĝas en la sesa numero de la jaro 2008 de TEJO-Tutmonde.

La dua JURE okazis en Seulo, Koreio, de la 28<sup>a</sup> ĝis la 30<sup>a</sup> de junio. Ses gejunuloj de Oomoto partoprenis en ĝi el Japanio. Post la partopreno en la 4<sup>a</sup> Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo en Iksan ekde la 27<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> antaŭtagmeze, Oomotanoj veturis al Seulo per KTX (korea rapidega trajno). En la junulara gastejo de Seulo interkona vespero okazis vespere je la 28<sup>a</sup>.

La dua interŝanĝo komenciĝis. La koreaj



partoprenantoj estis naŭ, inkluzivinte esperantistan interpretistino JEONG Eun-gyeong (eksprez. de Korea Esperanto-Junularo). Unue, s-ro YUN Bup-dal, la ĝenerala sekretario de Ŭonbulisma organizo "Amikoj de Paco" kaj la prezidanto de KCRP (Korean Conference of Religion and Peace), salutis bonvenige. Sekvante, s-ro SUZUKI Rintaro, la estro de Junulara Fakto de Oomoto transdonis salutajn vortojn. Kaj la salutmesaĝo de Gregor HINKER, la TEJO-prezidanto, estis prezentata. Ĝuinte multajn fotojn kun malantaŭa muziko pri la unua JURE, ĉiuj partoprenantoj sinprezentis. La flanko de Oomoto kantis Ŭonbulisman himnon "Ĉiame lumas luno" esperante kaj gejunuloj de Ŭonbulismo prezentis la mallongan dancon "Tri ursoj". Fine Oomoto donacis sanktajn librojn esperantajn de Oomoto kaj dolĉaĵojn de Japanio, ricevinte T-ĉemizojn kaj ombrelojn de Ŭonbulismo.

La 29<sup>an</sup> antaŭtagmeze, gejunuloj de Oomoto vizitis la templon Jogyesa, la centro de la plej granda budhisma eklezio





en Koreio, la centran oficejon de Cheondogyo (korea tradicia religio) ktp sub la konduko de Ŭonbulanoj kun esperantista interpretisto KIM Taewoo, kiu servis tiel ĝisfine. Sekvante, Oomotanoj vizitis filion kun preĝejo de Ŭonbulismo en Seulo kaj dediĉis mallongan preĝon. Ĉiuj partoprenantoj kune tagmanĝis honore kun la ĉeesto de KIM Seong-Chul, la prezidanto de Junulara Asocio de Ŭonbulismo. Posttagmeze gejunuloj de ambaŭ religioj turisme promenadis en Myeongdong (la plej vigla distrikto en Seulo) kaj Insadong (tradicia distrikto en Seulo). S-ro YUN regalis ĉiujn vespere per korea tradicia manĝaĵo "samgyetang" kaj alkoholaĵo "makolio".

Post vespermanĝo partoprenantoj de Oomoto okazigis "Vesperon de Oomoto" por koreoj en la preĝejo de Ŭonbulismo. Koreaj partoprenantoj estis dek du. La enhavo estis kiel fak-kunsido de Oomoto en UK. Unue, HIRANO Micuru klarigis ĉinkon-meditadon (Oomoto-meditado) kaj sub la ludado de Jakumo-kotoo (antikva korda instrumento) de KAZIMOTO Kaori, ĉiuj partoprenantoj faris meditadon. Sekvante, la DVD "Paŝoj de Oomoto", kiu temas pri historio de Oomoto, estis

prezentata. Post tio s-ro SUZUKI prezentis la parton de No-dramon (japanan tradician teatraĵon), manbatante ĝian instrumenton nomatan Cuzumi kun mia ĉantado. Kaj s-ro SUZUKI prezentis Nodancon "Takasago" kaj mi dancis "Sou ŝiarai". Sekvante ONICUKA Joŝiaki, la vicestro de Junulara Fakoj de Oomoto, regalis ĉiujn koreojn per japana verda teo. Fine partoprenantoj el Japanio kantis kanton de Oomoto "Junularo" esperante kun la ludado de gitaro de s-ro ONICUKA. Responde al bisado, japanoj rekantis kanton "Junularo", tamen ĉi-foje en japana lingvo.

Fininte prezentadon de Oomotanoj, ĉiuj iris al drinkejo kaj tostis! Reveninte la loĝejon, babilado inter gejunuloj de ambaŭ landoj daŭris ĝis noktomezo, kiel la ĝoja kaj gaja tempo eterne ne finiĝos. Antaŭtagmeze en la 30a la ferma ceremonio okazis. En ĝi kelkaj gejunuloj menciis impreson kaj prof. LEE Jung-kee (prez. de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado) transdonis ferman saluton post la saluto de s-ro YUN. En la flughaveno Incheon, gejunuloj de ambaŭ religioj adiaŭis, ĵurante la rerenkontiĝon en proksima estonteco.





## Nova estraro de TEJO kunvenis en Poznano, Polujo

La nova estraro de TEJO estis elektita dum IJK 2009 en Liberec', Ĉeĥujo. Ĝi unuafoje kunvenis inter la 18<sup>a</sup> kaj 21<sup>a</sup> de Septembro en Poznano, Polujo. La kunveno havis bonegan fruktodonan etoson, kie partoprenis ĉiuj estraranoj kaj eĉ du volontuloj, eksonta (Paŭlo) kaj sekvonta (Aleks). La estraro de TEJO diskutis kaj trovis solvon por la akraj demandoj de ofte malfruanta Kontakto kaj longe ne aperanta papera versio de Pasporta Servo. Krom tio la estraro de TEJO diskutis kaj decidis pri multaj aliaj temoj rilataj al TEJO-agado, ekzemple IJK, Komunikado, E@I, komisiitoj, KODEJO, retejoj kaj financoj.

Jen kelkaj punktoj kiujn la TEJO-estraro traktis:

### IJK

La plej populara junulara renkontiĝo, okazanta ĉiujare en diversaj landoj, sekvajare okazos en Kubo. La estraro diskutis pri problemoj en la organizado kaj pri taŭgaj solvoj. TEJO helpas al la organizantoj de Kuba IJK 2010 laŭ bezono kaj eblo, per spertoj de pasintaj IJK, pri administrado, k.a.

Por IJK 2011 la loko ankoraŭ ne estas decidita. Venadas diversaj proponoj, kaj ankoraŭ estas tempo kandidatiĝi ĝis la 31<sup>a</sup> de Januaro 2010.



dekstren: Sergej TYRIN, Oleksandra KOVYAZINA, Gregor HINKER, Łukasz ŻEBROWSKI, Paŭlo EBERMANN (eksvolontulo) kaj Paulína KOŽUCHOVÁ, Irmina SZUSTAK, Aleks BAUDRY (nuna volontulo)

TEJO ankaŭ strebas ke IJK okazu en Afriko. Kreiĝos laborgrupo por esplori pri eblecoj de IJK en Afriko.

### **Pasporta Servo**

La TEJO-estraro esperas aperigi libreton de Pasporta Servo en la komenco de jaro 2010. Aperos ankoraŭ aparta komuniko pri Pasporta Servo kiam detaloj klariĝos.

### **E@I**

TEJO kaj E@I interkonsentis multe kunlabori pri diversaj projektoj. Krome, antaŭ nelonga tempo E@I oficiale ekŝiĝis kiel faka sekcio de TEJO - ni gratulas al ili pro sendependiĝo kaj deziras multan sukceson. TEJO kaj E@I daŭrigos siajn rilatojn kiel partneroj.

### **Retejo**

La retejo tejo.org kreskas, kaj mankas jam spaco ĉe la servilo. Tial oni nun serĉas novan servilon. Post la transiro ekfunkcios la reta voĉdona sistemo por la komitato de TEJO.

### **TEJO-volontulo**

TEJO-estraro decidis ke la poŝmono de la TEJO-volontulo altiĝu ĉiujare, por

kompensi la inflacion kaj teni la monon samvalora.

### **Kontakto**

TEJO-estraro decidis pri kelkaj paŝoj kiuj helpas al Kontakto plu evolui kaj pli ĝojigi la legantojn. La estraro planas ŝanĝi la koncepton, kaj pere de enketo demandi legantojn, kion oni plej volas vidi en la revuo. Sekve ni kreos koncepton laŭ respondoj de legantoj kaj faros konkurson por nomumi novan redaktiston.

Tiuj decidoj sekvas diskutojn dum komitatkunvenoj kaj estrarkunvenoj.

### **Komunikado**

Estas la punkto kiu antaŭe ne tiel bone funkciis. Tial la TEJO-estraro preparis strategion por kunlabori kun ĉiuj amaskomunikiloj kaj regule dissendi informojn. Por tiu celo estiĝis la nova estrarposteno "respondeculo pri informado" kiun plenumas Oleksandra Kovyazina.

La kunveno okazis paralele kun ArKonEs. TEJO dankas al la organizantoj pro

## **TEJO-Komitato neformale kunvenis dum JES**

de Michael Boris Mandirola

La komitato de TEJO kunvenis en Zakopano (Pollando) la 2<sup>an</sup> de januaro 2010 okaze de la Junulara E-Semajno. La komitato kutimas formale kunveni unufoje jare, laŭeble dum IJK, do tiuokaze la kunveno estis eksterordinara kaj neformala.

Ĉeestis preskaŭ duona komitato kaj ĝi estis okazo por la nova estraro (elektita ĉi-julie) por prezenti al la komitato la laboron kiun TEJO plenumis dum la unuaj ses

monatoj de la estrarmandato. Krome tio estis okazo por plifortigi la rilatojn inter la estraro kaj la komitato kaj por pli libere diskuti la ontajn planojn, ideojn ekster formalaj skemoj. Ĉefaj priaĵoj estis la Internacia Junulara Kongreso, la financoj de TEJO, aktivula trejnado, eksteraj rilatoj kaj la administra funkcio de TEJO kaj ankaŭ flanke de la komitato estis partopreno aktiva, peta, prezenta kaj propona.

## PASPORTA SERVO: Ĉu RETA kontraŭ LIBRETA?

de Saŝa Kovyazina

La retejo pasportaservo.org havas jam pli ol mil uzantoj kaj komence de la jaro aperos la libro. Tiel plenumiĝos unu el la plej grandaj transformiĝoj de Pasporta Servo, ĉi-foje en la retan mondon. Sed la libreto restas grava parto de la servo, kaj simbolo kaj praktike.

Verŝajne multaj homoj havas demandon, ĉu la reta versio (ĉe [www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org), nomita PS2.0) estas anstataŭigo de la «klasika» libretversio.

La respondo estas ne. Sed ja libretversio iĝas aldonversio por la retejo. Certe ĝi estas kutima agrabla versio kiun oni povas meti en la poŝon kaj uzi en lokoj kie malfacilas retumi, kaj eblas montri al amikoj kaj diri: "Jen, vidu kiel funkcias Esperanto, mi povas konkeri tutan mondon ne elspezante por loĝado".

Sed la libretversio ankaŭ havas siajn malavantaĝojn, ĝi povas perdiĝi inter multaj aliaj libroj, ĝi povas rompiĝi, la informoj malnovas kaj ne eblas aliĝi se vi ĉiujn kvar monatojn ŝanĝas loĝlokon.

Tamen la retejo ankaŭ avantaĝas. Facila kaj rapida aliĝado, estas pli facile havi kontakton kun gastigantoj, la informoj ĉiam estas aktualaj se la gastigantoj translokiĝas, ŝanĝas adreson, telefonon, ktp, kaj estas pli sekure ĉar oni povas kaŝi adreson kaj retpoŝtadreson, kaj korespondi nur per la konto. Tre helpas trovi gastiganton per mapo en la retejo. Kaj se vi aliĝas al pasportaservo.org kiel "gastiganto" vi povos aperi en la papera versio. Nur gravas, ke vi indiku ĉiujn datumojn kaj veran nomon. Alia agrabla

momento de pasportaservo.org estas, ke vi povas ekkonatiĝi kun novaj esperantistoj kaj korespondi. Sur la retpaĝo vi povas legi blogaĵojn de aliaj pasportservanoj kaj skribi proprajn. Estas mojose multe, kion vi povas fari tie.

Tiukaze, estus erare aserti ke la reta versio kontraŭas kaj anstataŭigas paperan version. Estas nur malsamaj aspektoj de la sama reto.

### Iom da historio

Pasporta Servo, kiun redaktis stabile Derk Ederveen dum 13 jaroj, je la fino de 2008 estis transdonita al TEJO.

Derk pro personaj kialoj decidis transdoni Pasportan Servon kaj TEJO akceptis la prizorgadon de PS.

Sed ne tiom facilas, kiom ŝajnas. TEJO devas fari multajn aferojn denove.

Multaj jam komencis kompreni ke la libreto ne plu estas tiel bona varbilo, iam homoj ekopiniis ke estas pli facile trovi tranoktejon pere de la reto ĉe la neesperantistaj retejoj, ĉar ne ĉiam, la teoriaj gastigantoj volus havi gastojn; povus okazi, ke tiuj homoj forgesis malmembrigi aŭ simple ŝatas ricevi libreton. Do, la pasportserva libro komencis malgajni rilate al aliaj retejoj kun samaj servoj pro ĝia neaktualeco, kaj nemoderneco. Ne plu eblas uzi tion kiel bona varbilo.

Dum IJK 2008 en Szombathely (Hungario), oni decidis efektiviĝi la ideon de Pasporta Servo 2.0 en la reto, kiu fakte jam de pluraj jaroj estis diskutata. La ideo de retejo plisimpligis la uzadon por multaj uzantoj, ĉar pli kaj pli da esperantistoj

"loĝas" en la reto.

TEJO anoncis konkurson kaj kelkaj programistoj skribis proponojn. Unu propono estis akceptita kaj post unu jaro la retejo jam estis prezentita dum IJK 2009 en Liberec, Ĉeĥio. Kvankam la reta sistemo devigis rezigni pri la antaŭa sistemo, por ke kaj la retejo kaj la libretversio kongruu, oni devas ŝanĝi la sistemon de la kompilado. Pro tiu kialo, la retejo nombris malmulte da gastigantoj, sed tiu nombro, tagon post tago, pligrandiĝas.

### **Kiel kontribui**

Vi certe povas kontribui per aliĝado! Prefere per la reto, tiel oni povas pli facile kaj efektive prilabori datumojn. Aliĝinte certigu, ke vi plenigis ĉiujn viajn datumojn ĝuste, kun plena nomo, aĝo kaj adreso, ktp. Tio estas bezonata por aperi en la libro.

## **Pasporta Servo en vian hejmon, libre!**

Preskaŭ 800 gastigantoj ricevos la adreslibron. Ĉar okazis problemoj kun la poŝto en 2008, ĉiuj kiuj rajtis havi ĝin ricevos adreslibron de 2010 (ankaŭ kelkaj kiuj membriĝetis en 2009).

Kvankam ĝi aspektas simile, la ekzemplero 2010 de Pasporta Servo estas tre malsama, ĉar ĝi estis kompilita per alia metodo, kaj ĝi parte inkluzivas la datenojn de tiu ĉi



retpaĝaro. Ĝi ankaŭ enhavas informojn de gastigantoj kiuj aperis en la adreslibro de 2008 (eventuale kun ŝanĝoj, se oni informis pri ili al la oficejo de TEJO aŭ al landa organizanto). Ĝi do enhavas ankaŭ malfreŝajn datenojn (kiuj tiam estas indikitaj per bildo de horloĝo).

Pro tiuj gravaj kaj nepraj eventoj okazintaj dum la jaro, ni bedaŭrinde devas agnoski ke tiu libro enhavas erarojn, kaj pro tio la kompilanto persone kaj sincere bedaŭras kaj petas pardonon. Ni promesas ke la venontaj eldonoj estos pli bonaj. La adreslibro estos ankaŭ havebla en libroservoj.

Se vi volas aperi en la sekva eldono aŭ jam nun ĝui la servojn de Pasporta Servo, ni kore invitas vin membriĝi en la retejo [pasportaservo.org](http://pasportaservo.org)

Se por vi estas pli oportune aliĝi papere, kontaktu vian landan organizanton aŭ sendu al la oficejo en Roterdamo ([www.tejo.org/eo/kontaktu](http://www.tejo.org/eo/kontaktu)). UEA Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), telefono +31104361044, faksilo +31104361751.

Ankaŭ vi estas bonvena komenti pri PS al [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org) kaj [informado@tejo.org](mailto:informado@tejo.org).

Pasporta Servo 2.0 estas nova bebo de TEJO, kiu kreis ĝin kun doloro. Dependas de ni ke tiu bebo havu nun fruktodonan kaj ĝojan vivon. Kaj [pasportaservo.org](http://pasportaservo.org) kaj la libreto plu ĝojigos espertantistajn vojaĝemulojn.

Dum ni skribas tiujn liniojn, la retpaĝo nombras pli ol mil uzantoj, el kiuj preskaŭ sescent gastigas. La sekvan libron TEJO planas eldoni je la komenco de la jaro 2010.

## TEJO en COMEM

de Michael Boris Mandirola

La 13<sup>an</sup> kaj 14<sup>an</sup> de novembro en Torino okazis COMEM (la Asembleo de la Membroj de la Eŭropa Junulara Forumo). En tiu evento partoprenis reprezentantoj de la naciaj junularaj konsiloj kaj de la internaciaj junularaj organizoj por debati pri la problemoj de Eŭropa Junularo; ankaŭ TEJO partoprenis en tiu kunsido kaj mi ĝin reprezentis tiukadre. Dum tiuj du tagoj, krom la burokrataĵoj okazis laborgrupoj pri temoj kiel packulturo, klimat-ŝanĝiĝo, demokratio, praktik-instruado, ret-socio kaj statut-ŝanĝoj. TEJO-representanto partoprenis en tiuj pri packulturo (kie tamen oni devis nur trarapide trarigardi tekston kaj proponi ŝanĝojn al tiu antaŭverkita dokumento) kaj demokratio (ĝenerala diskuto pri la rolo de la junularo en demokratia partopreno kaj kolekto de opinioj pri tio).

Krome okazis prelegoj pri aliaj temoj, mi partoprenis en tiuj pri migrado (kie mi sukcesis havi kontaktojn kiuj povus tre utili al surloka esperanta agado) kaj pri Bolonja universitatprocezo. Poste okazis voĉdonado pri la rezultoj de la laborgrupoj. El tiuj estis ankaŭ la propono far kelkaj junularaj grupoj (nederlanda, germana, aŭstra, irlanda), eŭropaj federistoj kaj aliaj tri asocioj malestigi la francan lingvon kiel laborlingvo. Tiam estis la nura momento en kiu oni diskutis pri lingva problemo kaj mi alparolis la asembleon nome de TEJO. Ĉiuj partoprenantoj regis la anglan almenaŭ bonete kaj nur unu delegito uzis la tradukservon de la angla al la franca sed

evidentiĝis lingva principo. La principo ke unulingvismo ne estas bona afero kaj ke diverseco estas riĉeco kiu devas esti protektita kaj ne kontraŭigita. Fine okazis voĉdono kaj la propono forigi la francan kiel laborlingvon estis malakceptita danke al nur kvar voĉoj da diferenco.



Pli ĝenerale mi povas diri ke kelkaj malbonaj flankoj por mi estis mia nesperto (temante pri la unua COMEM dum la unua tago mi devis iomete kompreni kiel funkcias la tuta afero kaj mi estus certe multe pli aktiva se mi partoprenus en ĝi denove) kaj la fakto ke mi ne loĝis en la hotelo kaj tio iom malhelpis la kontaktojn kun la aliaj delegitoj kaj la partoprenon en la neoficialaj noktaj kunvenoj. Ĝenerale mi povas diri ke ĝi estas bonega kunteksto por pruvi ekziston de esperanton kaj informi pri ĝi kaj nia agado. Oni ankaŭ povas rilati kun aliaj asocioj kun kiuj valorus havi kunlaboron: laŭ mi indus pluesplori kun junularo de eŭropaj naciecoj kiuj la lingvan problemon alividpunkte altetaksas (do povus esti seminario pli lingvaj rajtoj, ekzemple).

Mi rimarkis la gravecon de stabila kaj multnombra reprezento. Pluraj demandis al mi kial TEJO ne ĉeestis dum pasinta jaro (ili diris ke ni estas sufiĉe "rimarkebla" organizo...) kaj multaj memoris pri pasinta longtempa delegitino

kiu longe reprezentis TEJO-n ĉe EJF; do estus bone ankaŭ por tio havi stabilan reprezentanton tie. Mi ankaŭ pensas ke estus bone havi (kiel multaj organizoj) kromreprezentanton ĉar tio estas investo kiu ege pliigas la eblon de kontaktoj neformalaj kaj aliflanke la partoprenon samtempan en pluraj laborkadroj en kiuj

antaŭenigi la ideojn de TEJO.

Resume por mi persone estis ege bona sperto kaj por TEJO EJF estas tre grava medio en kiu eblas informi neformale pri nia ekzisto kaj nia agado iomete preterpasante la memizoliĝon en kiu ofte esperanto-movado sin ĵetas.

## Kandidatiĝu por Komitataneco B de TEJO

Venas la tempo por kandidatiĝi kiel Komitataneco B de TEJO por la oficperiodo de la 1<sup>a</sup> de junio 2010 ĝis la 31<sup>a</sup> de majo 2012.

La Komitato estas la supera instanco de TEJO, kies taskoj estas difini ties ĝeneralan agadon, elekti Estraranojn kaj decidi pri ilia agado, aprobi la buĝeton kaj decidi pri reglamentoj. Ĝi konsistas el Komitatoj A, Komitatoj B, Komitatoj C kaj Estraranoj. La Estraranoj estas elektataj en ĉiu malpara jaro, kio okazis pasintjare dum la IJK en Liberec'. La cetero de la Komitato estas elektata en ĉiu para jaro. Ĝia nova oficperiodo estos de junio 2010 ĝis majo 2012. Komitatojn A nomumas Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO. Komitatoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo. Kaj fine, Komitatojn C elektos la jam elektitaj Komitatoj A kaj B.

Ĉiu individua membro de TEJO rajtas elekti sian reprezentanton en la Komitato de TEJO. Kaj same – ĉiu individua membro de TEJO rajtas kandidatiĝi kiel Komitataneco B kaj tiel rekte kundecidi en la Komitato pri gravaj okazaĵoj en la Organizo. Ĉi-foje oni rajtas elekti maksimume kvin Komitatojn B. Por eniri la Komitaton estas bonvenaj

aktivuloj de Landaj Sekcioj aŭ lokaj grupoj, kiuj per sia laboro pretas kontribui al la funkciado kaj evoluo de TEJO.

Via kandidatiĝo konsistu el la jenaj aferoj:

1 viaj personaj datumoj (nomo, naskiĝdato, reta kaj poŝta adreso, telefonnumero)

2 biografieto kaj deklaro pri viaj movadaj celoj, kiuj kune ampleksas maksimume 100 vortojn

3 via subskribo

4 subtenleteroj aŭ subtenaj subskriboj de minimume 5 individuaj membroj el minimume 2 landoj

**Via kandidatiĝo devas alveni plej laste la 15<sup>an</sup> de aprilo 2010.** Sendu ĝin aŭ paperpoŝte al la adreso de TEJO, aŭ retpoŝte al [officejo@tejo.org](mailto:officejo@tejo.org) kaj [gxen-sek@tejo.org](mailto:gxen-sek@tejo.org).

Detalajn informojn rilate la kandidatiĝon kaj elekton de la Komitatoj B vi povas trovi en la "Regularo pri TEJO" ĉe <http://www.tejo.org/eo/regularo> kaj en la "Reglamento pri elekto de Komitatoj B" ĉe

<http://www.tejo.org/eo/reglamentoj#elekto-komitatanoj-b>. Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti la TEJO-volontulon aŭ la Ĝeneralan Sekretarion.





## IJK2010: Los Cocos bonvenigas vin en IJK-etoso

Kun plezuro la kubaj gejunuloj invitas vin partopreni en la venonta IJK en Kubo (24-31 julio 2010) en la alloga kampadejo Los Cocos kiu troviĝas en Jibacoa, Santa Cruz del Norte, La Habana. La IJK-ejo havas loĝlokon por 400 personoj. Tie vi povas trovi bibliotekon, filmejon, naĝejon kaj aliajn amuzajn eblecojn. Ĝi troviĝas en la norda marbordo de Kubo, 45 kilometrojn for de Havano, meze de la vojo de Havano al banloko Varadero.

Pro la privilegia pozicio, ĝiaj komfortaj bangaloj kaj ĉirkaŭa medio, multaj vojaĝantoj dezirantaj paŭzon restas dum kelkaj tagoj en tiu ĉi turismejo antaŭ ol daŭrigi sian vojaĝon.

Ni nepre bonvenigas kaj bonvenigos vin, ĉar ni pensas ke la IJK-programo certe estos tiom alloga kiom la natura ĉirkaŭaĵo. Bonvenon al la 66-a IJK, ni certas ke vi ĝuos ĝin, vi travivos neforgeseblan IJK-n en Kubo.

*ĝisdatiĝu kaj aliĝu ĉe [www.tejo.org/ijk/2010](http://www.tejo.org/ijk/2010)*

## Konkurso Partoprenu IJK-n 2010

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. Per ĝi eblas peti monon por parte kovri vojaĝkostojn (laŭ plej malmultekosta maniero buse, ŝipe aŭ aviadile), loĝadon en provizitaj ĉambroj kaj programkotizon (vi povas loĝi pli lukse, sed ni subvencias nur la prezon por loĝado en la provizitaj ĉambroj, por kelkaj personoj, do la diferencon vi pagos). La estraro pritraktos la kandidatiĝojn kaj disdonos maksimume 3 premiojn — la premioj financos ĝis 80% de ĉiuj kostoj.

- Vi pretas ricevi kaj realigi taskon de TEJO dum kaj post IJK (la tasko estas interkonsentota kun la TEJO-estraro).

Por partopreni, vi devas plenigi aliĝilon, kaj kiu troviĝas ĉe [www.tejo.org/eo/p-ijk](http://www.tejo.org/eo/p-ijk) Kunsendu referencan leteron de unu TEJO-membro.

Via kandidatiĝo povas esti sendita retroŝte al [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org) aŭ paperpoŝte adresita al la Centra Oficejo kun la indiko TEJO – partoprenu IJK-n, kaj ĝi devas alveni al ni **antaŭ la 30<sup>a</sup> de marto**.

Kondiĉoj por kandidatiĝi estas:

- Vi estas membro de TEJO kaj aĝas sub 30 jaroj;

Se vi volas helpi la gejunulojn partopreni la IJK-n, bv. konsideri kontribui al la fonduso "Partoprenu IJK-n".

## De tertremo al helpemo

*La TT-redaktisto intervjuas Michael Boris pri la lasta IJF, nuligita pro tertremo en Italujo*

Tejo-Tutmonde: Saluton, Boris. Unue, diru kelkajn vortojn pri vi persone kaj kadre de IEJ.

Michael Boris MANDIROLA: Saluton al vi!

Mi estas Michael Boris MANDIROLA, juna esperantisto el Italujo. Mi esperantiĝis antaŭ 4 jaroj kaj nuntempe mi estas prezidanto de Itala Esperantista Junularo. IEJ estas la junulara sekcio de TEJO en Italujo kaj ĝia ĉefa agado estas organizado de Internacia Junulara Festivalo (IJF) ĉiujare ĉirkaŭpaske.

TT: Ĝuste pri IJF: la gazetaro tra la mondo raportis pri detruiga tertremo ĝuste en la sama regiono kie IJF estus devinta okazi. Kio okazis?

MBM: Kvar tagojn antaŭ IJF (la nokton inter la 5a kaj la 6a de aprilo) forta tertremo skuis Abruzon (itala regiono) kaj grave damaĝis la ĉefurbon L'Aquila kaj pluraj aliaj vilaĝoj mortigante pli ol 200 homoj. Parto de Italujo (ĉefe la centra kaj la suda) estas tertremema sed tiom forta tertremo ne okazis de pli ol 20 jaroj en nia

lando, ĝi estis sentita ankaŭ en Romo.

TT: Kion vi decidis fari do?

MBM: Ĉijare IJF estintus okazinta en Giulianova, mara urbeto en Abruzo, sed okazis tiu terura katastrofo. Do la festivalejo estis uzita por gastigi senheimigitojn kaj ni devis nuligi la festivalon. Tamen ni decidis iri en Abruzon malgraŭ la nuligo de IJF esperante ke tie eblu helpi iumanieroj kaj por prizorgi la esperantistojn kiuj estis venontaj malgraŭ la katastrofo: ni ja ne sukcesis havi precizajn informojn pri la situacio tie ĝis la mateno de la tago antaŭ IJF.

TT: Ni legis en la IEJ-retejo ke vi, krom akcepti la alvenintojn, faris ion konkretan por helpi la homojn de la regiono. Rakontu!

MBM: Jes, kiam ni alvenis surloke ni provis aktivigi por fari ion konkretan helpe al la tertremitoj. Nia loka aktivulo Massimo Ripani kontaktis la civilan helporganizaĵon de sia urbo kie oni kolektis manĝaĵojn kaj aliajn rimedojn por tuja neceso. Ni duope staris antaŭ kelkaj superbazaroj kaj petis al iliaj klientoj aĉeti konserveblajn manĝaĵojn kaj porinfanajn aĵojn. La kolekto estis tre sukcesa danke al donacemo kaj helpemo de la lokanoj: ni sukcesis kolekti preskaŭ duonan tunon da pastaĵo, pli ol 250 kilogramojn da ladskatolaj manĝaĵoj, 120 litrojn da lakto kaj tiel plu.

TT: Ĉu krom tiuj varoj vi ankaŭ kolektis monon? Al kiu organizo vi poste donos? Ĉu eblas ankaŭ estonte kontribui mone?





Se jes, kiel?

MBM: Poste ni ankaŭ starigis fonduson por kolekti monon de esperantistoj. La monkolektado daŭris plimalpli monaton kaj estis kolektitaj ĉirkaŭ 1800 €-n, parto el ili dum koncerto en Edimburgo danke al agado de Francesco Maurelli kiu konvinkis sian universitaton subteni nian

monkolekton. Ni decidis doni 1000€-n por la maldamaĝo de biblioteko de Sulmona (urbeto en Abruzo) kie estas rekta kontakto kun lokaj esperantistoj kaj la reston al la civila helporganizaĵo. Nia monkolekto jam finiĝis sed eblas doni monon rekte al la civila helporganizaĵo per ĝia oficiala konto.

TT: Ĉu kelkaj esperantistoj donacis la antaŭpagon al la fonduso?

MBM: Jes, ni ankaŭ donis eblon transdoni la monon de la antaŭpago al la fonduso helpe al Abruzo kaj kelkaj, ĉefe ĝejnuloj, efektive tion elektis fari.

TT: Tre bone! Mi dankas vin pro la intervjuo kaj gratulas la aktivulojn de IEJ pro la agado!

MBM: Dankon al vi pro la interesiĝo!

## Intervjuo al Aleks, nia volontulo en Roterdamo

TEJO-Tutmonde: Saluton Alexandre! Rakontu iom pri vi mem.

Alexandre Baudry: saluton, mi estas Aleks (mi preferas tion ol Alexandre, tro longa nomo), 28jaraĝa franco.

TT: Kiel vi esperantistiĝis?

AB: Mi esperantistiĝis antaŭ du jaroj. Mi provis unue per libro, sed kursoj ŝajnis multe pli efikaj. Do, mi sekvis intensan kurson faritan de la loka asocio de Lovenen-La-Nova (Louvain-La-Neuve) en Belgio.

TT: Ĉu? Kial en Belgio?

AB: Mi laboris tie dum kvar jaroj ĉe la universitato de la urbo.

TT: Jen kial :) Ĉu vi inter tiuj ĉi du jaroj partoprenis en multaj E-renkontiĝoj? Ĉu vi jam aktivis en la movado?

AB: Jes, mi partoprenis du IJKn kaj unu

ISn, inter aliaj. Ĝis nun mi ne multe estis aktiva en la movado, ĉar mi pigris kaj mi estas ankaŭ iom freŝbakita esperantisto.

TT: Do, kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo?

AB: Fakte, mi ne pensis esti volontulo. Mi ne pensis esti sufiĉe sperta esperantisto, kun malmulte da sperto en la movado. Sed, kiam mi vidis ke oni trovis neniun post la limdato (en aŭgusto), mi decidis proponi min. Mi esperas ankaŭ ke tio



estos sufiĉe bona sperto por mi, ke mi lernos utilajn aferojn, ekzemple mi ankaŭ iomete lernis la nederlandan en Belgio, kaj volus plibonigi miajn konojn.

TT: Kiom da lingvoj vi parolas/komprenas?

AB: Nu, mi parolas ĉefe la francan, la anglan, kaj Esperanton kaj havas kelketajn konojn pri la nederlanda kaj la hispana, inter aliaj. Sed, kiel multaj esperantistoj, mi ŝatas lingvojn, kaj ŝatus koni pli da lingvoj estontece.

TT: Kion vi volas fari por TEJO?

AB: Uj. kia demando! Mi unue volas bone fari kion oni demandas al mi.

TT: Kion vi esperas ekhavi de tiu ĉi posteno? Materie kaj/aŭ spirite, mi celas.

AB: Nu, spertojn, ĉefe komputilajn. Mi

volas ankaŭ esti utila.

TT: Fakte mi celis demandi ĉu vi pensas ke tiu posteno povus malfermi viajn pens-kaj ag-horizontojn.

AB: Mi esperas. Mi fakte estas nuntempe serĉanta mian vojon, kaj esperas ke tiu intertempa agado helpas min trovi tiun vojon.

TT: Kion vi studis en universitato? Kaj pri kio temis via posta laboro en la belgia universitato?

AB: Mi studis ekonomion, kun fakaj spertoj en statistiko kaj administrado de ekonomiaj datumbazoj. Mia laboro rilatis kun agrikultura ekonomio.

TT: Dankon pro la intervjuo!

AB: Dankon al vi!

## Fariĝu konscia subtenanto de TEJO!

### Fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, vi ankaŭ ĝuas proksiman partoprenon en la junulara movado, ĉar de TEJO vi ricevas:


- la revuon Kontakto
- la oficialan bultenon TEJO-tutmonde
- solenan akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- rabaton ĉe la aliĝo al IJK
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn

Por fariĝi Patrono de TEJO, bonvolu en la reta aliĝilo de UEA en la parto 3 klaki al PT—Patrono de TEJO (kompreneble, bonvolu plenigi ankaŭ la antaŭajn partojn: en la parto 2 vi povas samtempe aliĝi al UEA, aŭ elekti nenium, se vi ne nun deziras (re-)aliĝi al UEA).

En la ttt-paĝaro de UEA vi trovos la retan aliĝilon [www.uea.org/alighoj/alighilo](http://www.uea.org/alighoj/alighilo)

## Diabolik, la reĝo de la teroro - komikso

de Manuel Giorgini



Titolo: Diabolik - La reĝo de la teroro

Eldonejo: Edistudio

Prezo: € 6,00

Kun intereso kaj scivolo mi eklegis la duan elsendon de la projekto RoMEo, naskiĝinta por pliigi la nevastegan sortimenton de esperantlingvaj bildostrioj, kies unua tre sukcesa tasko koncernis tradukon de iu certa itala serio (Rat-Man), kaj kiu nun alfrontis kroman, grandan italan rolanton: Diabolik. La rezulto plensuperis miajn atendojn.

Mia kono pri Diabolik neniam estis spertuleca, sed tio ne donis malavantaĝon; RoMEanoj elektis la plej unuan numeron de tiu serio, kaj pro tio la rolantoj, la

eventoj kaj la scenoj prezentiĝas kaj sekvas unu la alian dolĉgrade. Mi do apenaŭ komentos la rakonton; mi nur rimarku ke la intrigo ne suferas la 47-jaran aĝon: ĝi fluas plaĉe, kaj nur je la plej unua parto ĝi montras ian etan troigon, kiu tamen praviĝas de propra kunteksto.

Lingvaspekte, ĉio laŭdindas. Traduko kaj adaptiĝo montras zorgon kaj efikon; la malmultaj fakaj aŭ maloftaj terminoj kuŝas komforte en pura, kohera lingvaĵo, kiu bone rezistas la influon de la itala lingvo. Nur du misetoj, preskaŭ nevideblaj, malhelpas la plenecon de poentaro. Efektive, la nova RoMEa kreitaĵo elvokigu grandan aprezon pro du bonaj kialoj. Unue, temas pri tradukaĵo kiu submetas sin al la grafika nelibero de bildostrioj, kondiĉo kiu devigas al la tradukanto adan kompromison inter la neceso komuniki la signifon, kaj la respekto de la fizika limo de la komunikilo. Due, ni substreku la drastan ŝanĝon en lingvaĵo kaj ĝenro, kiu akompanis la paŝon el Rat-Man ĝis Diabolik: subite malaperas vortoludoj kaj humuraĵoj, la rakonta spino de la kara kontraŭheroa orelulo, kaj ilin anstataŭas 136 ilustraĵoj da cerbumadoj, krimdeduktoj kaj nemankeblaj subitaj surprizoj. La tereno alias, sed la bariloj estas same valoraj, kaj neniuj lasiĝas sur la ŝultroj de la leganto. Suspenso, malhelo kaj la "suspendo de la nekredemo" sendamaĝe trairas la tempon kaj la esperantigon, kaj kaŝe atakas kaj ostaĝprenas la leganton ĝis la lasta paĝo.

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

TTT-ejo: [www.tejo.org](http://www.tejo.org)

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam

Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)

## Estraro de TEJO

- Gregor HINKER [gregor@tejo.org](mailto:gregor@tejo.org)  
(Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
- Oleksandra KOVYAZINA [sasxa@tejo.org](mailto:sasxa@tejo.org)  
(Informado, unua Vicprezidanto)
- Paulína KOŽUCHOVÁ [paulina@tejo.org](mailto:paulina@tejo.org)  
(Ĝenerala Sekretario)
- Irmína SZUSTAK [irmina@tejo.org](mailto:irmina@tejo.org)  
(Landa Agado, Vicprezidanto)
- Sergej TYRIN [kasisto@tejo.org](mailto:kasisto@tejo.org)  
(Kasisto)
- Łukasz Maciej ŻEBROWSKI [lukiz@tejo.org](mailto:lukiz@tejo.org)  
(Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur [www.tejo.org/patrono](http://www.tejo.org/patrono) aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe [www.tejo.org/aktivula\\_trejnado](http://www.tejo.org/aktivula_trejnado))
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

## Subteno la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe [www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html) aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

**TEJO dankegas vin pro via subteno!**